


# Brazilei

jaro 1 n-ro 3 2007/1



Ne volu unuformigi  
viajn gelernantojn!



Gasogena  
aŭto



# www.ileibr.org/butiko

## **Vojaĝo en Esperanto-lando**

Krestomatia gvidlibro al la Esperanta kulturo kun ekzercoj, por memlerno aŭ grupo.

Boris Kolker

**280 paĝoj**




R\$ 56,00

## **Infanoj en la mondo**

Kolore ilustrita broŝuro pri la kulturaj kaj ekonomiaj bezonoj de homoj tra la mondo.

32 paĝoj (21 cm x 30 cm)

**R\$ 17,00**



## **Saluton!**

7-a eldono de la fama rektmetoda lernolibro por memlernantoj, sed taŭga ankaŭ por kursoj.

234 paĝoj

**R\$ 34,00**



## Enhavo

<b>Karaj Geinstruistoj</b>	
Ĉu io nova en via lernoĉambro?	04
<b>Parolo de spertulo</b>	
Flora Molter Viana	08
<b>La Sekcio Interne</b>	
Laboro daŭras	14
<b>Enklasaj Travivaĵoj</b>	
Ne Difektu vian Lecionon	16
Gvidilo por Taksado de Lingvo-akirado	13
Specimena Leciono	22
Instrufaka Biblioteko	26
Dialogo per Proverboj	29
Taksu viajn Konojn	30
La Maljunulino kaj la Papago	32
Esperanto-kurso en Publika Lernejo	33
Tangram-Ludo	36
40-a ILEI-Konferenco	38
<b>Leteroj</b>	7
<b>Ni trovis en la reto</b>	20
<b>Notinde</b>	21
<b>Kurioza mondo</b>	28
<b>Aviztabulo</b>	34



## Ĉu io nova en via lernoĉambro?

Jen plia numero de la revueto. Ĝi iom malfrue atingas vin i.a. pro riparo en la komputilo de la redaktanto, kies sekvo estis perdo de signifa kvanto da informoj ne antaŭe sekurigitaj. Iom kompanse la revueto aperas kun pli da paĝoj, entute 40.

Pri la enhavo de tiu ĉi numero, ĝuu la parolon de pedagoga spertulino, Flora Molter Viana, kiu regalas la legantojn de Brazilei per informriĉa intervjuo (p. 8). "Ne Difektu vian Lecionon" (p. 16) venas kompletigi la 2-an parton de la artikolo pri Neŭrolingvistika Programado aperinta en la 2-a numero de la revuo. Kiel ankaŭ anoncote en la antaŭa numero, vi trovos specimenan lecionon (p. 22) bazitan sur la lernilo "Minicurso de Esperanto" de Jair Salles el Rio. Ni invitas ankaŭ vin regali la legantojn de Brazilei per sendado de specimena leciono pri via instruilo.

Ne forgesu partopreni en la konkurso pri la jubilea simbolo de UEA (p. 21) kaj same en la prilingva taksado sur paĝo 30. Libro-premio atendas la unuan sendinton de

# Geinstruistoj



korekta solvo. Amuziĝu per proverboj (p. 29) kaj, laŭeble kaj plaĉe, verku kaj sendu specimenan dialogon per proverboj cele al publikigo en sekvaj numeroj de Brazilei. Anstataŭ proverboj, eble vi preferos sendi pli leĝeran tekston kiel tiun pri maljunulino kaj papago (p. 32).

Rezulto de la konkurso "Izoliteco - forviŝu ĉi ideon" aperas sur la paĝo 35. Sube en la sama paĝo vi ĝuos plian bildstrion de Cecilia kaj ŝia nevidebla amikino Sofia.

Ĉu vi vojaĝos al Japanio aŭguste? Se jes, ne forgesu aliĝi por la 40-a ILEI-Konferenco okazonta en lando de krizantemoj, Ranzan, de la 11-a ĝis la 19-a (p. 38).

Ekde nun Brazilei aperigos ankaŭ materialon celantan porinfanajn kursgvidantojn. Ĉinumere ni invitas la kursgvidantojn ludigi siajn etulojn per ĉiame alloga ludilo, nome tangram-ludo (p. 36). Registru la tangram-solvojn de viaj lernantoj kaj sendu ilin por publikigo en sekvaj numeroj de la revueto.

Tiu ĉi numero de Brazilei atingos plej multajn kursgvidantojn fine de ties unua duonjara kurso. Sendu viajn kontribuojn tiel ke la sekva numero de la revuo aperos pli bunta kaj enhance riĉa.



Agrablan legadon!



## Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado havanta operaciajn rilatojn kun Unesko kaj aliĝinta al Universala Esperanto-Asocio (UEA)  
[www.ilei.info](http://www.ilei.info)



Brazila Sekcio de ILEI

**Provizora Sekciestro:** Joseo Tenorjo  
**Sekretariino:** Conceição Rodrigues  
**Kasisto:** Joel Afonso Francisco  
**Komitatano:** Marcos Zlotovich

Brazila Sekcio de ILEI funkcias ĉefe per interreto ĉe la adreso

**[www.ileibr.org](http://www.ileibr.org)**  
[geinstruistoj@ileibr.org](mailto:geinstruistoj@ileibr.org)  
[biblioteko@ileibr.org](mailto:biblioteko@ileibr.org)  
[butiko@ileibr.org](mailto:butiko@ileibr.org)

### Adreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera  
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo  
Telefono: 11 6155-7978

## Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata de Brazila Sekcio de ILEI


**ĉefredaktanto:** Joseo Tenorjo  
**kontakto:** [revuo@ileibr.org](mailto:revuo@ileibr.org)  
**grafikaranĝo:** Joseo Tenorjo  
**reviziantoj:** José Dias Pinto,  
Eurico A. Ribeiro, Conceição Rodrigues

**kunlaboris en tiu ĉi numero:** Flora Molter Viana, Paulo Sergio Viana kaj Ulysses Baldez


## ENKETOJ

Responde al la du enketoj starigitaj en la retejo de ILEI-br, de oktobro ĝis marto 2007, vizitantoj lasis siajn opiniojn pri jenaj temoj:

### Kie vi instruas Esperanton?



### Kursfinintoj apenaŭ legas esperantajn eldonaĵojn ĉar...





Post apero de la dua numero de Brazilei, ni ekricevis laŭdajn kaj afablajn vortojn de homoj iel koncernantaj al instruado, el pluraj partoj de Brazilo kaj eksterlando, al kiuj ni sendis ekzempleron de la revuo. El multaj tiaj vortoj kiuj atingis nin, la plej kuraĝiga mesaĝo tamen venis de instruistino el Minas Gerais, kiu delonge ne gvidadis kurson de Esperanto, sed post legado de la revueto, sentis sin pli stimolata reveni al la klasĉambro. Tiujn ĉi sentojn ni volonte dividas kun vi, esperante ke ankaŭ vi kundividu viajn enklasajn travivaĵojn tial ke Brazilei iĝu pli kaj pli praktika helpilo por kursgvidantoj.

“Dankon pro la specimena ekzemplero de Brazilei! Ĝi estas simple brila.” *Atilio ORELLANA ROJAS – sekretario de ILEI*

“Mi ricevis la bone preparitan kaj redaktitan revuon, kaj kore vin dankas kaj gratulas. Simpla kaj belaspekta.”  
*Paulo R. Santos - Divinópolis/MG*

“Nome de KCE, mi dankas la sendadon de tiu bonega revuo.” *David Bianchini – Campinas/SP*

“Koran dankon pro la sendo de Brazilei 2, ĝi estas same belega kaj interesa, kiel la unua!”  
*Ĵenja Amis, redaktorino de Kontakto*

“Gratulon pro la nova numero de la revuo! Mi avide tralegis ĝin unuspire, ĝue kaj lerne. Ĉiu serioza esperantisto devas legi kaj pripensi ĝin! Bonegan laboron vi faras!” *Paulo Sergio Viana, Lorena/SP*

“Koran dankon pro la bela interesa numero de via gazeto.” *Boris Kolker, Usono.*

“Kia plezuro! Kia interesa materialo! Tian mi neniam antaŭe vidis. Gratulegon pro la kompetenta laboro.”  
*Guilherme Jardim, Charqueada/SP*

“Gratulon al la skipo de ILEI-BR pro la belega kaj interesege nova numero de la revuo.” *Emilio Cid, São Vicente/SP*

“Mi ĵus konatiĝis kun BRAZILEI. Mi instruas Esperanton, sed ankaŭ studas. Tre gravas al mi la enhavo de BRAZILEI, kaj mi opinias, ke ĝi povas helpi min plenumi mian taskon kiel instruisto kaj kiel lernanto.”  
*Arnaldo Ribeiro da Silva, Duque de Caxias/RJ*

“Ni devas propagandi BRAZILEI, anonci ke ĝi havas belan paĝon, estas por la instruantoj de Brazilo (...)”  
*Neusa Prescottin Mendes (MiMa), Ribeirão Preto/SP*

### **NE VOLU UNIFORMIGI LA LERNANTOJN!**

Kun agrabla surprizo ni ricevis de nia kunlaboranto Paulo Sergio Viana, el Lorena/SP, la sekvan intervjuon, kiun li mem bonvoleme entreprenis kaj tradukis por la legantoj de Brazilei. Kvazaŭ pardonpete la intervjuinto volas klarigi la esperantigon de sia kontribuajo pro tio ke la intervjuito ne bone regas la lingvon.

Pravigo tute nenecesa, ĉar kio plej gravas estas la kono. Preskaŭ ĉiu fakulo en la mondo iam pagis (kaj pretas pagi) por ĉeesti prelegon pri sia fako en lingvo kiun li/ŝi malbone aŭ tute ne regas. Male, legantoj de Brazilei havas la bonan okazon legi enhave riĉan intervjuon en bona esperanta traduko!

La aldonajn notojn pretigis ni kaj ili celas resume bildigi al la legantoj la tri ĉefajn kaj diverĝajn teoriopensojn kiuj strebas klarigi kiel elvolviĝas la homa inteligenteco.

Ne kredu tamen ke la tuta enhavo de la intervjuo teorie ŝvebas en la aero. Al via lernoĉambro vi portos iom de la spertoj de sindediĉa edukistino kiu amas kaj bone regas la ilojn de sia laboro kaj pri ili afable kaj malavare ŝatas raporti.



# spertulo

## Flora Viana Molter



Flora Molter Viana estas 26-jara pedagogo, kiu loĝas en Lorena, posedas lernejon por etaj infanoj (ĝis 6-jaraj) kaj nuntempe faras postdiplomiĝan kurson por specialiĝo pri infanedukado. Sian lernejon (“Mondo Feliĉa”) ŝi kunhavas kun kolegino, kaj ili akceptas pli ol cent infanojn. Ilia entrepreno en 2006 ricevis municipan premion kiel modela institucio. Flora kaj ŝia partnero estas ofte invitataj prelegi pri sia sperto koncerne edukadon kaj administradon de edukinstancoj. Paralele: Flora faris la elementan kurson de Esperanto kaj sufiĉe bone komprenas la lingvon, sed ĉi tiu interparolo okazis en la portugala lingvo. Eble ni esperantistoj povas lerni iom de ŝiaj spertoj kiel edukisto:

(Intervjuis kaj Esperantigis Paulo S. Viana)

**Paulo Viana:** Ĉu pedagogo kaj instruisto estas la sama afero?

**Flora Molter:** Ne. Nuntempe, en universitato, la studoj de ambaŭ estas la samaj. Sed venas momento, kiam pedagogo devas elekti inter: lecionoj, administraci kaj organizoj lernejoj, orientoj instruistojn, orientoj gepatrojn kaj lernantojn. Aliflanke, ekzistas instruistoj diplomitaj en aliaj specifaj fakoj, kiuj ne estas pedagogoj sed rajtas instrui. Ekzemple: fakulo, kiu diplomigis pri matematiko, sed ne estas propre pedagogo. Tamen, tiu sistemigo ofte estas ŝanĝata, en Brazilo, kaj oni ne povas konsideri ĝin definitiva.

**Paulo Viana:** Kiel en Psikologio, ĉu ekzistas skoloj ankaŭ en Pedagogio?

**Flora Molter:** Dum kurso pri Pedagogio oni studas plurajn teoriojn, en tiu kampo: "Konstruismo", "Nova Lernejo", "Tradicia Lernejo", "Skolo Montessori", k.a.. Tiuj teorioj baziĝas sur pensoj de grandaj homoj: Piaget (pri infana elvolviĝo), Freinet (instrustrategioj), Vygotsky (konstruismo kaj sociigo de infanoj), Paulo Freire (edukado por socia emancipiĝo), k.a.. Sed pedagogo ne estas ia fakulo pri unu sola skolo; li utiligas tiujn rimedojn, kiujn li trovas oportunaj en sia laboro.

**Paulo Viana:** Al kiu pedagogia pensmaniero vi pli forte indentiĝas?

**Flora Molter:** Al "Konstruismo": instruado fokusanta la lernanton.

## EMPIRIISMO

Teoria koncepto asertanta ke la elvolviĝo de inteligenteco ricevas influon ne de la individuo mem, sed de la ĉirkaŭa medio; alivorte, de ekstere internen. Empiriistoj kredas, ke la homo ne naskiĝas inteligenta, sed li estas pasive submetita al la fortoj de la ĉirkaŭanta medio kiu estigas liajn reagojn. Bonajn reagojn oni alproprigas al si, dum malbonajn oni emas forigi. Laŭ tiu ĉi teorio, la intelekta elvolviĝo povas esti tute muldita de ekstere.

## RACIISMO

Teoria koncepto asertanta ke la elvolviĝo de inteligenteco ricevas influon ne de la ĉirkaŭa medio, sed de la individuo mem; alivorte, de interne eksteren. Raciistoj kredas, ke la homo jam naskiĝas kun antaŭmuldita inteligenteco. Sekve de tio rezonado estas denaska kapablo ĉe la homo. Laŭgrade kiel la homo maturiĝas, li reorganizadas sian inteligentecon laŭ siaj propraj perceptoj pri la ĉirkaŭa realaĵo.

La lernanto mem konstruas sian lernadon per spertado, ludado, esplorado.

**Paulo Viana:** Citu tri esencajn bonajn kvalitojn de instruisto.

**Flora Molter:** Kreemo: la kapablo agi en la klaso, meze de plej diversaj kaj neatendataj situacioj, kies solvon neniu manlibro antaŭvidas; sindonemo: necesas plonĝi en instruprocezon, intense dezirante, ke la lernanto lernu kaj agante konsekvence; aktualiĝemo: instruisto neniam estas finpreta, lernado neniam ĉesas kaj li devas akompani tion. Ne necese laŭ tiu ordo.

**Paulo Viana:** Citu tri oftajn malbonkvalitojn de instruistoj.

**Flora Molter:** La emo unuformigi la lernantojn: ne ĉiu lernanto lernas sammaniere kaj havas la samajn bezonojn, tiel ke ĉiun lernanton oni devas rigardi kiel unikan; privilegii unujn kaj diskriminacii aliajn lernantojn, pro malsamaj gradoj de talento kaj lernkapablo flanke de ili; rezisti kontraŭ konstanta studado por aktualigi siajn konojn. Instruisto devas ami studadon.

**Paulo Viana:** Kion vi opinias pri la instruado de fremda lingvo al eta infano?

**Flora Molter:** Mi konsentas, post la kvara jaraĝo, se vi celas instruadon en lernejoj. Mi kredas, ke la duan lingvon oni devas enkonduki en lernejon (laŭ formala instruado de la lingvo) post la kvara jaraĝo, ĉar post tiu ĉi aĝo la infano akiras iom pli da matureco laŭ diversaj sencoj: akiras pli da koncentriĝo dum

lecionoj, montras sin pli kapabla kompreni regulojn, akiras pli grandan vortstokon kaj ankaŭ ekposedas pli grandan lingvan maturecon (konstruo de dialogoj, pli granda komprenkapablo, malpli misuzado de literoj kaj sonoj inter aliaj aspektoj de infana lingvaĵo). Tiuj aspektoj pri la infana disvolviĝo faciligas la formalan lernadon de la lingvo.

**Paulo Viana:** Kaj pri tiuj familioj, en kiuj unu el la gepatroj parolas nur en Esperanto kun la infano, de la naskiĝo?

**Flora Molter:** Bonege! Tio riĉigas. Ne nur koncerne Esperanton, sed iun ajn alian lingvon. Sed mi supozas, ke per Esperanto la afero funkcias pli bone, pro ĝiaj facileco kaj logiko.

**Paulo Viana:** Kiu estas la plej taŭga aĝo por alfabetigo?

**Flora Molter:** Legi kaj skribi, en strikta senco, je la 6-a aŭ 7-a jaraĝo. Sed de la 2-a jaro kaj ĉefe post la 4-a, la infano ekkontaktas kun simboloj, kiuj estos al ĝi utilaj, poste: etikedoj kun ĝia nomo, libroj kun bildoj, aŭskultado de historioj, ludoj per literoj, k.s.. Infanoj, kiuj hejme ricevas tiajn stimulojn, en frua aĝo, evoluas pli bone en tiu kampo.

Jean Piaget



(1896-1980)

Svisa serĉesploranto pri edukado kaj pedagogio, detale klarigis kiel konstruiĝas ies konado ekde naskiĝo. Lia teorio pri Psikogenetiko estas la plej vaste konata konstruismo-koncepto pri formiĝo de klereco.

## KONSTRUISMO

Teoria koncepto asertanta ke la elvolviĝo de inteligenteco ricevas reciprokajn influojn kaj de la individuo kaj de la ĉirkaŭa medio. Konstruistoj kredas, ke la homo — ne naskiĝinta inteligenta, sed ankaŭ ne tute sub influo de la medio — reagas al la eksteraj stimuloj kaj agas super ili cele konstrui kaj ordigi sian propran konadon laŭ maniero pli kaj pli ellaborita.

## GVIDILO PRI TAKSADO DE LINGVO-AKIRADO

Fine de januaro aperis ĉe UEA, rezulte de ties kunlaboro kun la instrua TTT-paĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net) kaj la instruista faka asocio ILEI, la informkajero “La Komuna Eŭropa Referenckadro: Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj” [1].

La kerno de la 24-paĝa kajero estas la Esperanto-traduko de la unua ĉapitro el la plurcentpaĝa libro [2] eldonita de la Konsilio de Eŭropo kaj konsiderata la plej baza kaj grava dokumento en la eŭropa lingvoinstrua medio. En la kajero troviĝas ankaŭ la memtaksaj tabeloj de la Referenckadro kaj artikolo pri la uzo de la *Europass*-sistemo.

★ Per tiu ĉi eldonaĵo UEA kaj [ILEI](http://www.ilei.info) celas diskonigi la enhavon kaj la signifon de la Referenckadro, informi pri sia kunlaboro kun la Lingva Departemento de la Konsilio de Eŭropo kaj indiki la paŝojn faratajn kaj farotajn por ebligi al la monda esperantistaro pli bonkvalitajn kaj modernajn lingvouzajn kondiĉojn. La esperantistaj fakuloj pri lingvoinstruado nun alfrontas la defion oficiale kaj konsekvence apliki la novan skalon kaj la koncernajn terminojn, kaj ellabori kaj akreditigi novan, laŭnorman ekzaminsistemon de UEA kaj ILEI. Pri la progreso en tiu laboro informos la oficialaj organoj de ILEI kaj la porinstruista paĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net). ★

La broŝuro “La Komuna Eŭropa Referenckadro” estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. Ĝi estas ankaŭ rete elŝutebla ĉe [www.edukado.net](http://www.edukado.net), kies sekcioj Referenckadro kaj Katalogo havas pli da informoj pri la eldonaĵo.

La materialojn de la kajero tradukis Roel Haveman, Katalin Kováts kaj István Ertl. Pri la ĝenerala kunordigo kaj redaktado respondecis Katalin Kováts.

[1] Kováts, K. (red): Rotterdam: UEA, 2007. 24p.

[2] La titolo de la anglalingva versio (la verko ekzistas en kelkaj lingvoj): “The European Framework in its political and educational context” in: Common European Framework of Reference for Languages: Learning, Teaching, Assessment (CEFR). Strasbourg: Council of Europe, 2001.

# La Sekcio

## Laboro daŭras

Ĉinumere la legantoj de Brazilei ne trovos la kutiman rubrikon Parolo de la Sekciestro. Ekde la demisio de Prof. Antônio Félix, pro sankialo, en januaro pasinta, la Sekcio provizore funkcias sub la estreco de José Roberto Tenorio.

Sekve al la interna regularo de ILEI, komence de marto ni dissendis leteralvokon por prezentiĝo de kandidato al la vaka posteno. Ĉar neniu membro sin prezentis, la provizora sekciestro starigis enketon al la membraro por ke oni decidu ĉu balotado estu prokrastebla al pli favora momento aŭ ĉu oni apogas lian nomon. Pro iu misfunkciado en la elektronika balotilo (unua kontrolo pri la voĉdonado montris, ke nur unu membro reagis al la enketo, dum posta kontrolo montris, ke ok membroj aliris la balotilon por registri sian decidon), la enketo estos restarigita oportune, laŭ sugesto

# Interne

de la membro Rodrigo de Carvalho, kiu ĝuste kune kun Luiz Carlos avertis pri la misfunkciado de la balotilo.



Aliĝkampanjon de la Sekcio oni kutime lanĉas okaze de iu Esperanto-aranĝo profite de la multnombra partoprenantaro, alivorte, la Sekcio serĉadas aliĝontojn. La ĉijara aliĝkampanjo, malgraŭ la malpli granda nombro da aliĝoj (47 kompare kun 74 de la pasinta jaro), estis aparte grava: la aliĝopetoj venis plejparte per interreto (ne okazis la ŝtata E-renkontiĝo en San-Paŭlo novembre); alidirite, la Sekcio unuafoje estis serĉata! Tio montras la interesiĝon kaj apogon de la membroj al la klopodoj de la Sekcio disponigi servojn pli kaj pli praktikajn kaj alireblajn al kiel eble plej multaj kursgvidantoj.

Kiu dum la lastaj monatoj vizitis la retejon de la Sekcio, tiu konstatis la ŝanĝon de la reteja ekranŝildo kaj lanĉon de du novaj servoj, nome poŝta biblioteko (legu pli sur p.24) kaj retbutiko (vidu reklamojn sur la internaj kovriloj). Ambaŭ servoj estas kreitaj cele provizi kursgvidantojn per nemalhavebla lego-materialo kadre de la laborplano de la Sekcio por instrukapablo de instruemuloj.

Speciale

Enklasaj

Parto 2



Ne difektu  
vian  
**LECIONON**

APLIKADO DE NEŬROLINGVISTIKA  
PROGRAMADO EN LERNOĈAMBRO



# Travivaĵoj

*“Rakontu kaj mi forgesos, montru kaj mi memoros, partoprenigu min kaj mi komprenos.”*

Ĉina proverbo

Neŭrolingvistika Programado (NLP) ne estas inventaĵo de ĉinoj, sed per la ĉisupra proverbo oni povas dedukti, ke ĉinoj de multaj jaroj konas la principojn de NLP. Foje ni mem nekonscie uzas tiajn principojn en niaj ĉiutagaj interrilatoj kaj aktivadoj. La komunikado en lernoĉambro povas esti pli efika, se kursgvidantoj iel komencos konscie ekzercadi iujn principojn de NLP, kiajn:

## **KONSTANTA OBSERVADO**

Certe unu el plej misgvidaj sintenoj de kursgvidanto, des pli se temas pri lingva kurso, estas mem roli en lernoĉambro pli kiel parolanto ol kiel aŭskultanto. Parolema instruanto estas tempo-ŝtelisto (kaj mon-ŝtelisto, se la kurso estas kontraŭpaga). Profita leciono do estas tiu en kiu la kursgvidanto paroligas kiel eble plej multe la gelernantojn, atentis al iliaj paroloj. Tiel agante eblas konstati, eĉ iom surprize, ke multaj el ili ankoraŭ stumblas ĉe bazaj literkombinoj kiaj o/oj/ojn, a-o/aj-oj, ajn/ojn, malgraŭ tio

ke oni atingis la finon de la kurso. Maltrankviliĝi pri tio, ĉu fine de kvarmonata kurso oni atingis la lastan lecionon de la libro, ne devas esti la ĉefa prizorgo de kursgvidanto. Li bezonas zorgi ja pri kiel elvolviĝas la lernantoj. Sincere interesiĝi pri iliaj malfacilaĵoj. Tia flegado estigas agrablan lernetoson kaj favorigas la eltrovon de taŭgaj instruhelpiloj. Nenio estas pli kontraŭdira ol lernantoj kiuj multe laŭdas sian instruanton kaj mem ne sukcesas eldiri simplan frazon esperante.

## RESPEKTO AL LA LERNORITMO DE ĈIU LERNANTO

Ĉiu ordinara homo kapablas lerni ion ajn, sed ne ĉiuj lernas same rapide. En lernoĉambro ĉiam estas kelkaj lernantoj kiuj ne sukcesas akompani la lernoritmon de la ceteraj kolegoj. Ne temas pri nekapableco al lernado, sed nur tio ke ili lernas alimaniere. Por tiaj homoj necesas uzado de alispecaj lerniloj, sed ĉefe pacienco. Estas kelkaj kursgvidantoj kiuj, alpropriginte al si la lingvon post kelkaj monatoj da lernado, senpacience volas, ke ankaŭ iliaj gelernantoj rapide ellernu la lingvon por kunparoli esperante. Tiaj brilaj lingvemuloj estas la malplej taŭgaj kursgvidantoj por bazuloj. Pacienco kaj fido je la lernokapableco de siaj gelernantoj estas esenca sinteno de kursgvidanto. Sen tiu konvinko, instruado de lingvo estas nura transdono de vortoj.

## KREEMA IMPROVIZADO

Ĉiu instruanto emas al improvizado. Kurioze, ju pli sensperta estas la kursgvidanto, des pli ofte kaj damaĝe li/ŝi enkondukas ŝanĝojn en siajn lecionojn. Improvizantoj foje eĉ ŝanĝas la lernilon meze de la kurso, kredante ke ĝi estas la kialo de lecionrezigno flanke de la lernantoj! Kiam oni rezignas pri uzado de lernilo kaj provas elturniĝi per fotokopiaĵoj hazarde prenitaj el malsamaj lerniloj, oni multe riskas esti regata de la klaso anstataŭ ĝin regi.

Tio ne signifas, ke improvizado estas malbonvena en lernoĉambro. Male, ĉe spertintaj kursgvidantoj improvizado fariĝas arta rimedo por didaktike kaj kreeme eluzi la enhavon de *antaŭdifinita instruplano*. Alivorte, lertaj improvizantoj provizas siajn lernantojn

per ludoj *celantaj fiksi nur jam lernitajn lecionerojn*, evitante ŝtopi ilian kapon per novaj gramatikeroj.

Dum planado de lecionoj, oni pensu pri la vortoj de la usona filmoproduktanto Walt Disney: “Mi preferas distri la homojn kun la espero, ke ili iom lernu, ol lernigi ilin kun la espero, ke ili sin distru”.

## SPEGULECO DE SINTENO

En lingva kurso la parolo ludas esencan rolon. Kursgvidanto kun bona prononcmankiero produktos bonajn elparolantojn. Sed parolado ne estas la nura esprimilo enkasa. Korpolingveco foje estas pli esprimpova ol vortoj mem! Povas okazi, ke kursgvidantoj apenaŭ atentis pri tiu ĉi esprimeblo de homa komunikado, sed lernantoj facile kaptas tiajn nevortajn signojn kaj tiamaniere konstante taksadas la instrukapablecon de sia instruanto. Plej ofta plendo de kursgvidantoj estas, ke lernantoj malfermas la libron nur en lernoĉambro. Sed ĉu ankaŭ kursgvidantoj havas tempon malfermi sian instruilon hejme por sin prepari cele bone regi la lecionon enklase? Aŭ ĉu vi estas tia kursgvidanto kiu improvize preparas la lecionojn ene de la buso veturanta al la kursejo, dividas la lernantaron laŭ lernokapableco, kompatas aŭ senpaciencaj pri ilia lernoritmoo? Jen momento por pripensi vian instruagadon. Kundividu viajn spertojn kun aliaj instruistoj, legu pli, daŭre lernu. Kursgvidanto kiu, veninte al la fino de leciono, nenion novan lernis, ankaŭ nenion novan pasigis al la lernantoj.

### **Acorda Professor - PNL na Arte de Educar**

[Vekiĝu Instruisto - Neŭrolingvistika Programado  
en la Arto pri Edukado]

Sirlei Bernades

Eldonejo Komedi, 2003 – Campinas/SP

144 paĝoj laŭ formato 14x21 cm

ISBN 85-7582-048-6

Lingvo: portugala

Kontakto: editora@komedi.com.br



## Amikumu trans naciaj limoj

Kiel Instruisto, vi certe jam spertis almenaŭ unu el tiaj situacioj: 1-e oni diras al la gelnantoj ke per Esperanto oni povas korespondadi kun esperantistoj el pli ol 100 landoj, sed ne diras kie troveblas iliaj adresoj; 2-e oni insistas pri la riĉigo de tia korespondado, sed mem ne havas tempon por traserĉi interreton por trovi alilandajn korespondantojn. Nun intruistoj kaj lernantoj povas iri al unu sola loko kaj havi kontakton kun pli ol 1000 esperantistoj el 80 landoj. Temas pri la unua interkona retejo en Esperanto nomata Amikumu! Interesa servo de la retejo estas la ebleco kontroli per mapo la loĝlokon de la membroj, en multaj okazoj eĉ vidi la straton kie ili loĝas! Vizitu la retejon ĉe

[www.amikumu.com](http://www.amikumu.com)




## Plibonigu viajn tekstojn

Jen interesa kaj utila retejo por tradukemuloj. Krom ligiloj al divestemaj terminaroj, la vizitanto trovas fakajn tekstojn kun konsiloj pri tradukado de

kantoj. La prizorganto de la tradukserva retejo estas la nederlandano Hoel Haverman, tradukinto de furoraj kanzonoj por esperantaj kantistoj kaj rokbandoj. Notu la adreson en via agendo kaj ĝin vizitadu ĉe

<http://www.tekstoj.nl/esperanto>

### KONKURSO PRI JUBILEA SIMBOLO POR LA 100-JARA UEA



Okaze de la centjariĝo de Universala Esperanto-Asocio, en 2008, ties estraro lanĉis konkurson pri jubilea simbolo. La serĉata simbolo, kiun oni uzos nur lige kun la jubilea festado, devas emfazi la historion de la Asocio, ĝiajn celojn kaj idealojn. La interesatoj, ĉu esperantistoj aŭ ne, rajtas partopreni per pli ol unu konkursaĵo, kies gajninto ricevos 500 eŭrojn kiel premion. Oni sendu la konkursaĵojn ĝis la 30-a de junio 2007 al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; aŭ rete al simbolo@co.uea.org . Por pliaj informoj vizitu la retejon de UEA ĉe <http://www.uea.org>

### REAPERAS BULTENO “FAMILIA ESPERANTO”

Post dujara interrompo reaperis la oficiala organo de Rondo Familia de UEA. La kolore ilustrita 20-paĝa bulteno estas redaktata de Claude Rouget el Norvegio kaj enhavas i.a. raportojn pri novjaraj Esperanto-aranĝoj, inviton al la Internacia Infana Kongreseto en Jokohamo, porinfanajn rakontojn kaj versaĵojn, spertojn de diverslandaj Esperanto-familioj kaj resuman raporton pri la pasinta jardeko de Rondo Familia. La bulteno estas legebla en la retejo de Rondo Familia, [http://uea.org/rondo\\_familia](http://uea.org/rondo_familia) , kie oni povas legi ankaŭ ĝiajn antaŭajn numerojn kaj iom koni pri la historio de Rondo Familia.

### SALUTKARTOJ BEZONATAJ

Kutima baza kurso de Esperanto en la Universitato de Kostariko komenciĝis je la 9-a de marto 2007 kaj daŭros ĝis la 30-a de junio. 22 studentoj ĉeestas la oficialan semestran kurson kaj ĝin gvidas Prof. Hugo Mora, kiu petas ke esperantistoj el pluraj partoj de la mondo sendu kuraĝigajn mesaĝojn per bildkartoj. Fine de la kurso la instruisto priaranĝos ekspozicion kaj donacos ĉiujn bildkartojn al la lernintoj kiel memoraĵojn. Kontaktadreso: Prof. Hugo Mora - Kurso de Esperanto, Esc. de Filología, Ling. y Lit. Universidad de Costa Rica - San José, Costa Rica - retpoŝto: <miaumiau1@ice.co.cr>

### ILEI KONFERENCO 2007

La 40-a Konferenco de ILEI okazos en Ranzan (Japanio)  
de la 11-a ĝis la 19-a de aŭgusto 2007

temo: **Virinoj en Esperanto-kulturo**

informoj pri programo, konferenco kaj partoprenkondiĉoj  
legeblas en la retejo de ILEI ĉe [www.ilei.info/novajxoj/ranzan.pl](http://www.ilei.info/novajxoj/ranzan.pl)  
alio al la reta aliĝilo ĉe <[www.ilei.info/konferenco/alighilo2007.php](http://www.ilei.info/konferenco/alighilo2007.php)>



# Specimena. Leciono

Tenoro

“Paroligu la lernantojn pli multe ol vi mem dum la lecionoj.”

*Andreo Cseh*

“*Minicurso de Esperanto*”, verkita de Jair Salles, estas praktika lernilo por enkonduka kurso enhavanta kvin lecionojn. Unuarigarde oni emas supozi, ke mankos lernomaterialo por sukcesigi la kurson. Tial kurgvidantoj — kiuj simpatias al la verketo, sed ankoraŭ ne bone komprenis ĝian celon kaj estrukturon — ne sin detenas de la tento aldoni pli da leciono-unuoj.

Per tiu ĉi specimena leciono oni konstatos, ke kio gravas, ĉefe koncerne al instruado de lingvo, ne estas la kvanto da lernomaterialo prezentata de kursgvidanto, sed la maniero kiel li ĝin prezentas.

Alia motivo kial multaj instruantoj volas ŝanĝi la enhavon de iu lernilo estas tio ke ili malkonsentas pri iuj gramatikeroj enkondukitaj de la aŭtoro. Plenan konsenton pri tio oni ne facile atingos, ĉar ĉiu gramatikilo estas rezulto de preferoj de unuopaj aŭtoroj. Pli profitdone do agas kursgvidantoj kiuj devojiĝas de tiaj detaloj kaj koncentriĝas en la celon de la lernilo: prepari lernantojn por ke ili korekte el- kaj ekparolu esperante.

La sekvaj sugestoj (aliajn oni trovos en la enkonduko mem de la verketo) koncernas nur al la aŭtoro de tiu ĉi artikolo. Per ili oni intencas nenion alian ol a) montri, ke eblas adapti iun ajn lernilon al la kursgvidanto-personeco

sen neceso ŝanĝi la enhavon mem de la lernilo; b) inviti aliajn kursgvidantojn uzi tiun ĉi spacon por prezenti al la legantoj de Brazilei leciono-specimenon pri sia instruilo.

## KONSISTO DE INSTRU-UNUO

(por 90-minuta leciono unufojon semajne.  
Vidu bildon de leciono-unuo sekvapaĝe)



## Gramatikaj notoj [1]:

kiel ĉisupre jam dirite, tiu ĉi parto estas la malplej grava el ĉiuj lecioneroj kaj tial oni ne perdu multe da tempo klarigante ilin: 15 minutoj sufiĉas por enkonduki tiajn gramatikaĵojn. Hejme, se la lernanto interesiĝos, li povos relegi tiujn notojn kaj ilin kompletigi per pliaj klarigoj legeblaj en la dua parto de la libro.

## Vortareto [2]:

Tie ĉi jam komenciĝas la lingva laboratorio de la verketo. La kursgvidanto elparolas ĉiun apartan vorton, ĥore sekvata de la lernantoj. Per rigora kontrolo de ĥora elparolado, la kursgvidanto ripetigu kiom necese eventualan misprononcon. Tempo bezonata por tiu ĉi parola “varmiĝo”: 5 minutoj.

## Dialogo [3]:

Jen ni alvenas al tre interesa kaj bone ellaborita parto de la leciono, nome teksto por kunparoligi tri lernantojn. La lecionero konsistas el mallonga dialogo por du roluloj kun eta enkonduko por tria rolulo. Tie ĉi validas la proverbo:

*kiu ripetas abunde, lernas plej funde.* Multaj kursgvidantoj legigas la tekston nur du-tri fojojn kaj tuj saltas al alia lecionero, supozante ke ripeta legado lacigas la lernantojn. Tio ne okazas, se en ĉiu legado oni proponas defion al ili. Al la ordinara laŭta kunlegado fare de kursgvidanto sekvata de la lernantoj, aldonu jenajn defiojn: a) se la klaso ne estas mult-nombra, kontrolu individuan legadon de la teksto. Dum legado, ne interrompu la leganton por korekti lin; anstataŭe, skribu surtabule eventualajn misprononcojn kaj fine de la legado ripetu ilin ĥore; b) legu po unu frazo kaj hazarde invitu lernanton por traduki ĝin; c) petu ke ĉiu lernanto portugale rakontu per propraj vortoj kion li/ŝi komprenis el la teksto. Se

vi bone atentis, vi rimarkos, ke plej ofte la lernantoj ne kaptas la enhavon de la teksto, malgraŭ tio ke li korekte tradukis ĝin. Tio okazas, ĉar ili tradukas la tekston, sen konsidero al la kunteksto! ĉ) profite al la gramatikaj notoj [kiuj dualecione prezentas verbo-finaĵojn], relegu la tekston kaj defiu la lernantojn levi la brakon ĉe aŭdado de verbo-formoj (ne forgesu peti ke ili fermu la libron!); [de nun legigu la

lernantojn kaj kontrolu hazardajn misprononcojn *fine de la legado*]; d) voku po tri lernantoj kaj petu ke ili legu la tekston, ĝis ĉiuj alterne ludos la tri rolojn: kiel enkondukanto, Lila kaj Leno; e) nu, la lernantoj jam ripete ludis la tri rolojn kun bona prononcado kaj vi senpacience volas salti al la sekva lecionero. Ne faru tion ankoraŭ... Observu tre gravan detalon: la lernantoj ne plu stumblas dum legado [gratulu ilin!], sed ili ankoraŭ restas sklavoj de la libro. Defiu ilin eldiri la frazojn, levante la kapon desur la libro almenaŭ ĉe la lasta(j)

**2-a LECIONO**


2

**TELEFONO**

Leno estas en la Esperanto-Klubo.  
Sed Lila estas hejme.  
Lila vokas al li.

**LILA:** - Ho!  
**LENO:** - Mi deziras paroli  
...  
... ti. Kia parolas?

**LILA:** - Io nova?  
**LENO:** - Jes!... Morgaŭ mi parolos en  
la kunveno de la klubo.  
**LILA:** - Ho! Bonege!...  
**LENO:** - Ĉu vi venos al la klubo?  
**LILA:** - Kompreneble!  
**LENO:** - Do... ĝis morgaŭ!  
**LILA:** - Ĝis!...

---

**RESPONDU**

Studu por respondi sen konsulto al la teksto.

- 1 - Kiu estas la ĵurnalo?  
- Li estas Leno.
- 2 - Kiu estas la ĵurnolino?  
- Ŝi estas Lila.
- 3 - Ĉu Leno studas nun?  
- Ne, li ne studas nun.
- 4 - Ĉu li telefonas al Lila?  
- Jes, li telefonas al ŝi.
- 5 - Kio okazas morgaŭ?  
- Morgaŭ li parolos en la klubo.

4

**VORTARETO**

TELEFONO - telefone (subst.)  
 TELEFONO - telefonas (verb.)  
 TELEFONA - telefona (subst.)  
 TELEFONO - ao telefona (subst.)  
 Li telefonas al mi.  
 ESTI [esti] - ser or estar  
 LA - a, o, es, as (arti)  
 EN - en; EN LA - en.  
 ESPERANTO-KLUBO -  
 SED [sed] - mas  
 HEJMO [hei-mo] - casa (=lar)  
 HEJME [hei-me] - en casa  
 AL - a, para (prepozicio)  
 HA LO? [ĥa lo] - Ĉu!  
 DEZIRI - desiri?  
 PAROLI [paroli] - fular  
 KUN - kom  
 ESTAS MI. - Sou eu...  
 KIU [kiu] - quem  
 HO! [ho] - Ĉu!  
 BONĜE! [bon-ĝe] - Ótimo!  
 IO - algo  
 NOVA [nova] - novo/a  
 IO NOVA? - Algo (de) novo?  
 MORGAŬ [mor-ĝa] - amanhã  
 KUNVENO - reunião  
 DE - de; DE LA - de, da, dos, das  
 VENI - vir  
 AL LA - ao, à, aos, às  
 KOMPRESI - compreender  
 KOMPRESIBLA - compreensível  
 KOMPRENIBLA - Naturalmente!  
 (Li.) - compreensivelmente  
 DO - então  
 ĜIS [ĝis] - até  
 ĜIS MORGAŬ! - Até amanhã!  
 ĜIS... - Até!... (foz: Tchau!)  
 JUNA [juna] - jovem (adj.)  
 ĴURNALO [ĵurnalo] - (om) jovem  
 ĴURNOLINO [ĵurnolino] - (ama) jovem  
 STUDI [stidi] - estudar  
 NE [ne] - não  
 KIO [ki-o] - o que  
 OKAZI - acontecer  
 ... Li. = literalmente.



vorto(j); f) Laste proponu relegadon de la dialogo kun iliaj propraj nomoj anstataŭ tiuj de Lila kaj Leno. Praktikado de tiu lecionero postulas minimume duonon de la leciondaŭro.

## Demandaro [4]:

Fine ni alvenas al plia grava lecionero. Kelkaj rimarkoj pri la dialogo validas ankaŭ tie ĉi: laŭvoĉa kunlegado, unuopula tradukado, legado kun kapo-leviĝo ĉe la lasta(j) vorto(j) i.a.. Aldoniĝas jenaj rimarkoj: a) la kursgvidanto unuafoje demandu portugale, poste nur esperante; b) kursgvidanto ne estas leciongvidanto, sed nura kontrolanto. Post montri kiel fari demandojn esperante, lasu ke ili mem elektu kunparolanton; c) post du-tri vico-demandado, proponu ke ili prezentu la demandojn laŭ nesinsekva ordo. Tio postulos ke la lernantoj streĉos la orelojn. Se oni ripete demandas laŭ sinsekva ordo, la vicoaldemandotoj jam scias kion oni demandas kaj tial ili ne multe atentos al la leciono. Uzu trionon de la leciondaŭro por praktikado de tiu ĉi lecionero.

### NOTAS GRAMATICAS

- 1 - CONJUGAÇÃO VERBAL - Em Esperanto, *todos os verbos terminam, no Infinitivo, em "U", no Presente em "AS", no Passado, em "IS", no Futuro, em "OS", no Condicional (ou "Futuro do Pretérito"), em "US", e no Imperativo, em "U" - sempre em estas terminações para todos as pessoas gramaticais.*

Ex.: Infinitivo: AMI - amar; - Presente: MI AMAS - eu amo; VI / (ou: vocês amam); LI AMAS - ele ama; NI AMAS - nós amamos; (ou: elas) amam; - Passado: MI AMIS - eu amei; VI AMIS - você amaram; etc.; - Futuro: MI AMOS - eu amarei; VI AMOS - você amará (ou: vocês amarão); etc.; - Condicional: MI AMUS - eu amaria; VI AMUS - você amaria (ou: vocês amariam); etc.; - Imperativo: AMU! - ame!, amem! (ou: amai!, amai!).

QBS - O Passado do Esperanto pode equivaler aos nossos três Passados (Pretérito Perfeito, Imperfeito e Mais-que-Perfeito). Assim, por exemplo, de acordo com o contexto, "MI AMIS" pode ser traduzido por "eu amei", "eu amava" ou "eu amara".

- 2 - "UL" - O sufixo "UL" indica um indivíduo caracterizado pela raiz da palavra. Ex.: NOVA - nova/a (adjetivo); NOVULO - um novato (substantivo - por isso termina em "O"); RICA - rico/a; RUCULO - um (homem) rico; etc. E tem feminino. Ex.: JUNA - jovem (adj.); JUNULO - um jovem; JUNULINO - uma jovem; etc.

- 3 - "GE" - Usa-se o prefixo "GE" (pronuncia: "guê") quando se quer enfatizar a reunião de duas, três ou mais pessoas (ou animais) de ambos os sexos. Ex.: LERNANTO - aluno; LERNANTINO - aluno; GLEARNANTOJ - alunos (de ambos os sexos); etc. Geralmente, porém, o simples uso do masculino plural (por ex.: LERNANTOJ - alunos) pode, como em Português, de acordo com o contexto, dar a idéia de tratar-se de ambos os sexos.

### CHAVE-TESTE

#### AO TELEFONO

Leno está no Clube de Esperanto.  
Mas Lila está em casa.  
Ele telefona a ela.

LILA: - AĤ!  
LENO: - AĤ! Eu desejo falar com Lila...  
LILA: - Sou eu... Quem fala?  
LENO: - Leno...  
LILA: - Algo de novo?  
LENO: - Sim! Amanhá eu farei reunião do clube.  
LILA: - Oh! Ótimo!...  
LENO: - Você virá ao clube?  
LILA: - Naturalmente!  
LENO: - Então... até amanhã!  
LILA: - AĤ!...

#### RESPONDA

- 1 - Quem é o jovem?  
- Ele é Leno.  
2 - Quem é a jovem?  
- Ela é Lila.  
3 - Leno estuda agora?  
- Não, ele não estuda agora.  
- Ele telefona à Lila?  
- Sim, ele telefona a ela.  
- O que acontecerá amanhã?  
- Amanhá ele falará no clube.

## Traduko-kontrolilo [5]:

Lecionero kie la lernanto mem povas kontroli sian tradukon pri la tekstoj aperantaj sur la maldekstra paĝo, respektive de la dialogo kaj de la demandaro. Tiu ĉi rimedo, kies ĝusta uzado estas bone klarigita sur p. 8 de la verko, celas ĉefe memlernantojn. Malkiel iuj opinias, ĝia uzado enklasa ne malhelpas la lecionon, ĉar kiam oni transiras al pure esperanta lingvo-trejnado, ĝi restas tute senutila.

Plia servo de la Sekcio jam estas en plena funkciado atende al via vizito ĉe la retadreso **www.ileibr.org/rmms** temas pri poŝta biblioteko destinata al la membroj. Tiu ĉi servo estas parto de la agado de la Sekcio kadre de sia laborplano por instrukapabligo de kursgvidantoj laŭ tiu maksimumo ke bona instruanto neniam ĉesas lerni.



La komenca librostoko estas donaco de Fondaĵo Thorsen, pere de UEA, al subteno de esperantaj bibliotekoj. La prunto servo estas malfermata al pliaj donacoj de titoloj koncernantaj al Esperantologio kaj metodiko de lingvoinstruado.

Legu sekvaĵaĝe liston de kelkaj titoloj jam prunteblaj.

## REGULARO POR PRUNTO DE LIBROJ

- ★ Prunto-peto akcepteblas kaj per interreto kaj per poŝto.
- ★ Membroj rajtas prunti po nur unu libro ĉiupete.
- ★ Limdato por redono de la libro estas 30 tagoj, prokrastebla dum pliaj 30 tagoj, se neniu alia membro vice atendas prunton de la koncerna libro.
- ★ Prokrasto-peton oni povas plenumi kaj per interreto kaj per poŝto.
- ★ Ekspedon (iro kaj reveno) de la libro pagos la pruntopetinto mem.
- ★ Oni ne akceptas monon, nur poŝtmarkojn.
- ★ La Sekcio pagos la iro-ekspedon, kies valoron la membro redonos per poŝtmarkoj kune kun la libro.
- ★ Ne redono de libro senigos la membron je la rajto plu uzi la bibliotekon.

## METODIKO

**Metodiko de la Esperanto-instruado.** *Rudolf Rakuša*

**Esperanta mozaiko.** *F. Faulhaber*

**Psikologio kaj metodiko de Esperanto-instruado.** *Boris V. Tokarev*

**Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado.** *Irena Szanser*

**Ĉefaj principoj de fremdlingvo-instruado,** *La. A.S. Melnikov*

**Instrui Esperanton por komuniki** *Catherine Samain*

## VORTAROJ

**8000 frazeologiaj esprimoj Esperantaj.** *A. Csiszár, K. Kalocsay*

**Ilustrita frazeologio.** *Sabine Fiedler*

**Esperantonimoj.** *Marinko Ĝivoje*

**Esperantaj sinonimoj.** *Jaana Ojalo*

## ESPERANTOLOGIO

**Vortoj de Andreo Cseh.** *Artur E. Iltis*

**Bona lingvo, La.** *Claude Piron*

**Lingvo kaj vivo.** *Gaston Waringhien*

**Beletro, sed ne el katedro.** *G. Waringhien*

**Kaj la ceter' - nur literaturo.** *Gaston Waringhien*

**Vortoj de Profesoro Th. Cart.** *Pro Esperanto*



## LINGVISTIKO

**Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo.** *Daniel Moirand*

**Serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo.** *Umberto Eco*

**Vojaĝo inter la tempoj.** *K. Kalocsay*

**Arto kaj naturo.** *Reto Rossetti*



## LERNILOJ

**Saluton!** Esperanto aŭtodidakte. *Audrey Childs-Mee*

**Baza kurso en Esperanto, La.** *Audrey Childs-Mee*

## PEDAGOGIO

**Reguloj de vivo.** *Janusz Korczak*

## PORINFANAJ

**Unuiĝintaj Nacioj: Venu kun mi!** *Nane Annan* Tradukis *A. Löwenstein*

## BIOGRAFIOJ

**Janusz Korczak** *Alicja Szlakaŭova*



## GASOGENA AŬTO

Brazilo pli kaj pli famiĝas kiel produktanto de alternativaj karburajoj por aŭtoj. Sed kion fari kiam enlanda rezervo de benzino elĉerpiĝas? Tio okazis en Brazilo okaze de la dua mondmilito kaj jen kiel aŭtoposedantoj elturniĝis.

Pro la milito, la importado de benzino ĉesis kaj la tiamaj brazilaj aŭtoj ekuzis gasogenon (kun vegetala karbo). Ene de du grandaj cilindroj, adaptitaj ĉe malantaŭa parto de la aŭto, brulis karbo, kies vaporoj iris ĝis la karburatoro por funkciigi la motoron. Okazis ke aŭto funkcia per gasogeno ne produktis sufiĉe da energio por laŭiri deklivon. Meze de tiaj vojoj la stiristo bezonis haltigi la aŭton, elaŭtiĝi kaj per ventumilo kreskigi la flamojn de la karbofajro. Nur post akumuliĝo de gaso en la cilindroj, la aŭto akiris pli da potenco por daŭrigi la veturadon deklive supren.

Iom poste oni havis la ideon instali ene de la aŭto, ĉe la stiristo, ventolilon mane funkciantan. Kiam la stiristo perceptis, ke al la aŭto mankas movoforto, li turnis la ventolilon cele produkti pli da vento sur la braĝoj... kiuj produktis pli da varmo... kiuj produktis pli da gaso ene de la cilindroj...

Gasogeno estis uzata ankaŭ en busoj, kamionoj kaj vaporŝipetoj.

Fonto: [www.morrodomoreno.com.br/materia94.htm](http://www.morrodomoreno.com.br/materia94.htm)

## Dialogo per proverboj

### Du retanoj interbabilas esperante...

- Bonvenon al la rondo amata!
- Dankon pro la saluto frata!
- El kie vi tajpas?
- El mondo vuala kun adreso virtuala...
- Ĉu vi ja estas poeto aŭ havas klapon en la kapo?
- Ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu.
- Via ludo tamen plaĉas al mi.
- Propra supo brogas, fremda allogas!
- Nu, permesu min demandi ion...
- Demandu tuj. Se elsaltas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo.
- Post kiom da jaroj, via opinie, la mondo agnoskos nian babiladon?
- Hako post hako estas la plej efika atako. Koncerne agnoskon, pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento.
- Nia babilado dume restas senvalora...
- Ankaŭ kulo nenion valoras, sed ĝia piko doloras. Cetere, ŝlosilo uzata ruston ne konas.
- Do, la sekreto...
- Ege simpla: unue, restu tajloro en sia laboro; due, ne puŝu vian regularon en fremdan anaron.
- Kiu tion ripetas abunde, lernas plej funde!
- Kaj evitas grandan frakason en malgranda glaso...
- Tio meritas publikigon!
- Zorgu ke lerneja sekreto ne iru al gazeto.
- Al Braziloj, mi volas diri...
- Ŝerce dirite, cele pensite. Nu, alvenis fino al mia latino.
- Kun miro kaj gapo, ĝis retajpo!

Ĉu vi ŝatas lingvajn ekzercojn? Plenigu la sekvan demandaron kaj sendu la respondojn al [geinstruistoj@ileibr.org](mailto:geinstruistoj@ileibr.org) aŭ al la poŝtadreso de la redaktanto (vidu en la kolofono). La unua korekta respondo kiu atingos nin gajnos libro-donacon.

**Taksilo 1:** Reskribu la frazojn tiamaniere ke netransitivaj verboj aliĝu al transitivaj per kunmeto de prepozicio, kaj anstataŭigu substantivojn per iliaj koncernaj pronomoj. Ekzemple:

La birdo flugas **ĉirkaŭ** la arbo.  
Ĝi **ĉirkaŭ**flugas ĝin.

1. La knabo naĝas tra la rivero.
2. La lernantoj bicikle iras trans la ponton.
3. La patrino parolas al la gefiloj.
4. La knabinoj ekskurse iras sur la monton.
5. La familio ferie vojaĝas tra Eŭropo.

**Taksilo 2:** Anstataŭigu la subjekton per la koncerna pronomo kaj aliigu la prepozicion al adverbo. Ekzemple:

La filo staras apud la patro.  
Li staras **apude**.

1. La arbo staras antaŭ la domo.
2. La hundo promenas kun la knabino.
3. La infanoj vojaĝos post kelkaj tagoj.
4. La nova najbaro konas neniun ĉirkaŭ la urbo.
5. La kato dormas sub la tablo.

**Taksilo 3.** Reskribu la frazojn tiel ke la verbo de la propozicio aliĝu al substantiva participo, kaj la adverba komplemento aliĝu al simpla adjektivo. Ekzemple:

Jozefo promenas sur la strato.  
La **surstrata** promenanto estas Jozefo.

1. Petro staras senmove.
2. Nikodemo kruele batas Jozefon.
3. Alico senintence malŝaltis la lumon.
4. Karlo ĵus alvenis.
5. Antono severe riproĉas la knabojn.

**Taksilo 4:** Reskribu la frazojn tiamaniere ke la verbo de la unua propozicio aliĝu al substantivo per helpo de taŭga prepozicio. Ekzemple:

**Kiam** la suno leviĝos, ili komencos labori.  
**Post** la sunleviĝo, ili komencos labori.

1. Kiam ni revenos, ni telefonos al vi.
2. Kiam ŝi finos sian laboron, ŝi vizitos nin.
3. Kiam la bebo naskiĝis, ŝia vivo iĝis pli signifoplena.
4. Kiam li diplomiĝis, multaj volis dungi lin.
5. Kiam mi petis, ke li eniru, li ridetis kaj dankis.

“Mi parolas plurajn lingvojn; kiam mi parolas la naciajn, la lingvo regas min; kiam mi parolas esperante, mi regas la lingvon.”

*Danlanda blinda esperantisto*

# La maljunulino kaj la papago

Iam vivis maljunulino tre soleca. Ĉar ŝi havis neniun kun kiu paroli, ŝi aĉetis papagon kaj komencis paroligi ĝin. Ĉiutage ŝi lernigis novajn vortojn al la papago, sed ĝi parolis neniom.

La jaroj pasis kaj la bona kaj afabla maljunulino pacience ekzercigis la besteton per homaj vortoj, sed sen sukceso.

Iun tagon, kiam la maljunulino havis eĉ ne forton por paroli plu, jen la papago ekkriis: "Forkuru, sinjorino! La domo ekbrulas! Forkuru!"

La maljunulino kuris, sed al la papago, tute emociplena: "Mia papago parolas! Mia amata papago parolas! Mi sciis ke vi parolos!".

Ŝi estis tiel kontenta aŭdi la voĉon de sia amata besteto, ke ŝi ne vidis ke la fajro formanĝas la domon kun ŝi kaj la papago kune.

## **Moralinstruo:**

*Jen kio okazas al tiu, kiu ne kredas je sia invento.*

ilustraĵo: Ulysses Baldez





# Esperanto-kurso en publika lernejo



En Natal finiĝis plia baza Esperanto-Kurso realigita ĉe municipa lernejo Prof. Waldson Pinheiro.

Tri gravaj faktoj motivigis la realigon de tiu kurso en la koncerna lernejo: la lernejo portas nomon kiu omaĝas esperantiston Waldson Pinheiro (laŭmemore), la aktiva partopreno de alia esperantisto, prof. Marcos Campos, kaj la decida kaj tuja akcepto de la lerneja estraro.

Entute, la kurso daŭris tridek lecion-horojn kun duhora leciono ĉiusabate gvidata de instruistoj Ivaldo Alves kaj Marcos Campos, kiuj utiligis la rektan metodon, laŭ Andreo Cseh.

Hodiaŭ, la 8-an de marto, dek finlernintoj, en solena okazaĵo kaj antaŭ la ĉeesto de ĉiuj geinstruistoj kaj gelernantoj, ricevis atestojn post praktika demonstrado pere de dialogoj, poezioj, muzikoj kaj eĉ parolo de la unua klasano. Samokaze Asocio Potigvara de Esperanto transdonis DVD-aparaton, kodiskon kun muzikoj en Esperanto, vortarojn kaj T-ĉemizojn al la unuaj tri plej bonaj lernintoj.

En la sama solenaĵo estis anoncita la fondo de Esperanto-Klubo Waldson Pinheiro. Ĉiuj lernintoj decidis partopreni en la klubo kaj jam elektis la unuan estraron. En la 10-a de marto, sub la organizo de la klubo kaj apogo de Asocio Potigvara de Esperanto, jam komenciĝis du novaj kursoj: unu kompletiga kun partopreno de dek gelernantoj kaj alia baza kun partopreno de tridek unu gelernantoj. Post prezento kaj aprobo de projekto, tiuj du lastaj kursoj okazos sub la financa apogo de la Projekto "Escola Aberta" subvenciata de la Ministerio pri Edukado.






**Cearaa Esperanto-Asocio** gastas sin en nova sidejo kaj klopodas starigi bibliotekon por disponigi al la vizitantoj de la Asocio legomaterialon en kaj pri Esperanto. Donacoj de libroj kaj revuoj estas bonvenaj kaj la donacoj devas kontakti la sekretariinon, s-ino Damiana Brito per la retpoŝto <anaimmad@yahoo.com.br>

**Monda Organizaĵo** por la Disvolviĝo de la Intra-Esperanta Ekonomio, mallonge Intraespo, invitas esperanto-instruistojn kaj tradukistojn dezirantajn agadi profesie sur la kampo de instruado de Esperanto. Por pliaj informoj bonvolu sendi mesaĝon al <ong@intraespo.org>

**Hungara** intruistino de bazlernejo instruanta ankaŭ Esperanton en kvara klaso al 23 gelernantoj ĉirkaŭ 10-jaraĝaj, serĉas samaĝajn korespondantojn tutmonde. Kursgvidantoj de Esperanto interesataj partoprenigi siajn gelernantojn en internacia amikeca etoso povas interkonsenti interklasan korespondadon rekte ĉe <ilonaf@freemail.hu>

De la 6-a ĝis la 22-a de decembro 2006 la instruisto Gonzalo Collantes el Kubo gvidis 2 bazajn kursojn ĉe CEFET-Maceió/AL. Aliĝis 51 homoj kaj finis la kurson 28. La plej granda parto estas gelernantoj de tiu teknika lernejo kaj ili deziras daŭre lerni. Pliaj informoj ĉe Aristophio A. A. Filho: <esperantomaceio@yahoo.com.br>



**Esperanto-Klubo "João Ernesto"** en Ubá/MG ekde marto pasinta disponigas bazan kurson por plenkreskuloj en sia reformita sidejo. La kurso funkcias ĉiusabate matene kaj kostas nur R\$ 10,00 monate. Pliaj informoj kun la kursgvidanto Wäner Marliere Arruda per lia poŝtadreso <wanerma@yahoo.com.br>

## Rezulto de la konkurso "Izoliteco - forviŝu ĉi ideon"

Al la kursgvidantoj estis proponita la kompletigo de la frazo "Taŭge instrui estas..."

Osmar da Silva Alves (San-Paŭlo/SP) per kontribuado hajkoforma gajnis DVD-filmon Gerda Malaperis :

*Taŭge instrui / Estas lernad' amuza / Kaj sen enui*

Elmir dos Santo Lima (Rio-de Janeiro/RJ) gajnis ekzempleron de "Manual de sobrevivência para o professor particular [de idiomas]", da editora Disal, pro sia konkursaĵo: "Taŭge instrui estas... okazigi grup-stabilecon kun profitcela lingvouzado skriba kaj parola."



### Korekto


En la dua numero de Brazilei (p. 8) aperas la informo ke Ismael Gomes Braga estas la aŭtoro de la fama verko "Esperanto sem Mestre". Laŭ informo de la intervjuito, Jair Salles, Ismael Gomes Braga eldonis en 1939 verketon kun 10 lecionoj nomatan "Esperanto sem Mestre". Tiu verketo konsistis el gramatikaj reguloj, ekzercoj pri traduko el Esperanto al la portugala. 10 jarojn post la eldono de tiu verketo, Valdomiro Lorenz prunteprenis la nomon de la menciita verketo, laŭ konsento de la aŭtoro, kaj eldonis sian samnoman version de la populara verko.

### Cecilia - Ulysses Baldez





# Tangram-ludo

Oni ne certas pri la origino de tiu ĉi ludilo. El kelkaj legendoj rilatantaj al ĝi, la plej populara eble estas tiu pri ĉina imperiestro kiu faligis spegulon. Dum remuntado de la spegulo, li rimarkis, ke la 7 restantaj pecojn oni povus rearanĝi laŭ nekalkuleblaj formoj, tiel kreante sennombrajn bildojn.




Tangram-ludo konsistas el kvadrato dispartigita en sep geometriaj bildoj: kvin trianguloj, kvadrato kaj paralelogramo. La ludo ankoraŭ estas multe uzata en la tuta mondo, ĉefe por pedagogiaj celoj. Ĝia ludado postulas nenian specialan lertecon de la ludantoj, sed nur iom da tempo, paciencon kaj imagpovon.


Pligrandigu la tangram-bildon ĉisupre, reproduktu ĝin sur dika kolora kartono kaj invitu viajn gelernantojn al ludado. Laŭ rigora regulo de la ludo, oni devas uzi po sep pecojn por ĉiu bildo. Malobeo al tiu ĉi regulo validas, se oni celas nur amuziĝon. Agrablan ludadon!



staranta homo





fortulo



kelnero

laboranta homo



homo ĉe komputilo



## LANDO DE KRIZANTEMOJ ATENDAS VINI!

la 40-a ILEI konferenco en Japanio konsistos el du partoj:

- La 11-14-an labora parto
- la 15-18-an ekskursa kaj kultura parto.

Japanio de proksime —

### **ĝia kulturo malfermiĝos tuj antaŭ viaj okuloj!**

Dum la konferenco vi povos partopreni ne nur en prelegoj proponitaj de niaj samideanoj kaj invititaj gastoj, sed ankaŭ ĝui tre specialan kulturen programon, kiu helpos pli bone ekkoni Japanion de proksime. En la dua parto de la konferenco ni okazigos seminarion pri ikebano, origamio, ceremonio, kimono, sorobano, kaligrafio.

Por dezirantoj konatiĝi kun japana kuirarto, kiu nun estas tutmonde konata kiel provizanta sanigan manĝon, ni proponas bankedon (la 14an de aŭgusto) en restoracio „Nagoriĝi“. Dum ĝi ni ĝuos specialaĵojn de la japana kuirarto.

#### VI ESTAS INVITATAJ PARTOPRENI EKSKURSOJN AL:

**NIKKO** (la 15-an de aŭgusto) registrita kiel *Monda Kultura Heredaĵo de Unesko* en 1999, estas konata kiel unu el la plej famaj vidindaj lokoj en Japanio.

**KAWAGOE** (la 16-an de aŭgusto) La urbo konservas la etoson de Edo-periodo (17~19a jarcento) kaj troviĝas multaj temploj, malnovaj butikoj kaj aliaj. Unu el la vidindaĵoj en la urbo estas ligna sonorilturo *Tokino-kane*, kiu origine konstruiĝis en la mezo de la 17a jarcento.

**OGAWA** (la 18-an de aŭgusto) la urbo jam longe estas konata pro japana tradicia papero *waŝi*. En Saitama *Artemia Centro*, kiun ni vizitos, ni povas vidi eĉ memsperti se vi volus la faradon de waŝi.

**TRA RANZAN** (la 17-an de aŭgusto) ni piediros ne tra la urbocentro sed aliflanken al la ravino *Ranzan-keikoku*, kie fluas la rivero *Tukigawa*. Ĉirkaŭata de arboj kaj freŝa aero ni refreŝiĝos kaj ĝuos naturon japanan.

**Pliaj informoj** pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en <<http://www.ilei.info/novajxoj/Ranzan.php>>

Reta aliĝilo en <<http://www.ilei.info/konferenco/alighilo2007.php>>


# www.ileibr.org/butiko

“**La Brusela Bubo**” estas traduko de la rakonto numero 180 el la serio “Suske en Wiske” de W. Vandersteen.

Ĝi estas la unua esperanta traduko de nederlandlingva populara kaj mondfama bildrakonto, jam tradukita en multdekojn da lingvoj.

58 koloraj paĝoj  
**R\$ 24,00**

**Esperanto Elektronike** Bunta materialo pri la internacia lingvo Esperanto cele al diskonigado ĉefe ĉe ne esperantista publiko.



**R\$ 14,00**

(Rim. Ero funkcia nur per komputilo kun DVD-legilo)



# Leganto

Retbutiko de Brazila Sekcio de ILEI



Por ke vi rigardu instruadon alimaniere.  
[www.ileibr.org/butiko](http://www.ileibr.org/butiko)